

La heroo vivo de Henri Dunant, 12-a parto Claude Gacond, 107-a radioprelego, 1964.12.16 & 19

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la dekduan elsendon pri tiu temo.

Henri Dunant nun estas famulo. La parizaj salonoj lin festas. Li provas varbi al sia idealo ĉiujn renkontitajn personojn : aristokratojn, bankistojn, intelektulojn, militistojn... En entuziasmaj leteroj, tiuj kontaktitoj sendas siajn helpopromesojn. Kolonelo Hubert Saladin ekzemple skribas : « *Se per miaj rilatoj kaj mia plumo mi povas vin helpi por io, tiam disponu je mi.* »

Kion alportas la homo de Solferino al tiuj entuziasmoj ? Idealon, kiu kapablas plenigi sencelajn vivojn. La apog-promesoj de tiom da admirantoj kvazaŭ blindigas nian ĝenevanon, kiu jam facile tendencas identigi sian personecon kun sia idealo. Nun li prenas siajn revojn por la realeco. Kaj el la kvin komisionanoj de la Ĝeneva Komitato, plej ageme li agitadas por la starigo de la Ruĝa Kruco.

Unu el la plej firmaj apogantoj venas el Nederlando. La kuracisto Basting sin entuziasme proponas por la traduko de **Rememoro pri Solferino** en la nederlandan. Per tiu laboro li deziras varbi al la idealo de Henri Dunant la publikan opinion kaj la registarajn mediojn de sia lando.

La Ĝeneva Komitato faras sian laboron. La entuziasma Henri Dunant estas ofte kritikata de la realista Gustave Moynier. Sed tamen kunlaboro ankoraŭ ekzistas inter ambaŭ homoj. Tiu kunlaboro naskas Konkordaton en dek punktoj pri la sukuro al la militvunditoj kaj pri ideo kunvoki en Ĝenevon mem Internacian Konferencon, kiu devus ratifi tiun Konkordaton.

Henri Dunant sentas la mankon de povo de tiu Ĝeneva Komitato. En kia nomo ĝi kunvokas Internacian Konferencon ? Kiu partoprenos tiun Kongreson ? Ĉu nuraj filantropoj aŭ registaraj reprezentantoj ? Henri Dunant pluan fojon forgesas siajn alĝeriajn aferojn por varbi plej multe da registaraj reprezentantoj al tiu Ĝeneva Konferenco, kies sukceso aŭ fiasko signifos ĉu la naskiĝon, ĉu nenaskiĝon de la dezirinda Ruĝa Kruco. Por diskonigi siajn ideojn en germanajn mediojn Henri Dunant partoprenas en Berlino la Kvaran Internacian Kongreson pri Statistikoj. Kun la nederlanda kuracisto Basting, kaj kvankam la sukuro al la militvunditoj ne multe rilatas al statistikoj li sin trudas en ĉiujn invito-kunvenojn.

Basting per tondra voĉo proklamas en la kunsidoj : « *Sinjoro Dunant trovis rimedon por plilongigi la vivon de la homoj, kaj por ilin savi.* » Tiu trafa aserto ĉesigas la protestojn pri la ekstera demando kaj permesas al la amiko de la aŭtoro de **Rememoro pri Solferino** anonci la gravan Ĝenevan Konferencon.

Basting kaj Dunant ne nur kontentiĝas varbi en la medio de la statistikistoj. Ili trovas ĉiujn eblajn rimedojn por viziti gravajn berlinanojn kaj membrojn de la prusa registaro. Fine ili estas ricevataj de la prusa reĝo mem. La raporton pri tiu aŭdienco ili propagandcele diskonigas tra tuta Eŭropo.

Dum siaj diskutoj Basting kaj Dunant subite alvenas al nova principo : la neŭtraligo de la kuracistoj, sukuristaj volontuloj kaj ambulancoj sur la batalkampoj. Sen iu ajn permeso de la Ĝeneva Komitato ili rapidege redaktas kaj presigas cirkuleron, kiu proklamas tiun ĉi principon. Ni citu tri el ĝiaj paragrafoj :

« *Ĉiu registaro konsentos sian protekton al la Ĝenerala Komitato, kiu estos kreita en ĉiuj eŭropaj ĉefurboj.*

« *Ĉiu registaro deklaras, ke de nun la kuracista militpersonaro kaj tiuj, kiuj dependas de ĝi, inkluzive la sukuristajn volontulojn agnoskitajn, estos rigardataj kiel neŭtraluloj far la militantaj potencoj.*

La heroa vivo de Henri Dunant, 12-a parto
Claude Gacond, 107-a radioprelego, 1964.12.16 & 19

Ĉiu registaro faciligos la transporton de la sanitara personaro kaj de la proviantoj, kiujn la societoj sendos en la militantajn landojn. » (Fino de la citaĵo.)

Neniam Gustav Moynier, la prezidanto de la Ĝeneva Komitato, pardonos al Henri Dunant tiun iniciaton.

Tiu cirkulero tamen ludas decidigan rolon en la kampanjo de Basting kaj Dunant por la sendo de registaraj delegitoj al Ĝenevo. Ĝi vekas intereson de la registaroj. Do, kaj ĉefe por malpermesi sankciigon de tiu principo de la neŭtraleco de la Ruĝa Kruco, ili subite decidiĝas sendi oficialajn delegitojn al Ĝenevo.

La 2-an de oktobro 1863, tio estas je kelkaj tagoj antaŭ la malfermo de la Ĝeneva Konferenco, dum aŭdienco la saksa reĝo prononcas frazon, kiu ne falos en la orelojn de surduloj : « *Mi faros mian eblon pro vin helpi, diras lia moŝto Johano, ĉar certe nacio, kiu ne partoprenus tiun homaman laboron, perdus la publikan estimon en Eŭropo.* » Henri Dunant tuj diskonigas tiujn parolojn. Li uzas ilin kiel sloganon por diplomatia ĉantaĝo. Kaj malgraŭ la opozicio de la militministro de la franca imperio eĉ Napoleono la tria cedos al tiu argumento sendante delegiton.

Tiel la Ĝeneva Konferenco havos oficialan karakteron, kaj Henri Dunant fieregas pri tio. Sed Gustave Moynier lin tre malvarme akceptas, kiam li alvenas en Ĝenevon unu tagon antaŭ la alveno de la delegitoj. Li riproĉas tiun ĉantaĝon kaj en si mem ĵaluzas la sukcesojn de sia sekretario.

Ni multobligos la tekstojn de tiu elsendaro pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj. Tiurilate ni profitas saluti sinjoron Richard Schneller en Chur, Svislando, kaj Gerhard Kunze en Berlino, kiuj petis ekzempleron de tiu teksto. Ni salutas ankaŭ sinjoron Jean Mangenot en Flize, Francujo, kiu bone ricevis nian broŝuron pri la ĝemeliĝo de urboj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-